

LA 18-a INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO-KONGRESO

10.07. – 15.07. 2012 OPAVA, ĈEĤIO



Eva KOPEČNA

Dum la 17-a IMEK en Hungario esperantistoj el Opava, Ĉeĥio, post 13 jaroj denove akceptis rolon de organizantoj de la 18-a IMEK. La 3-persona Loka Organiza Komitato (Eva Kopečna, Vlastimil Kočvara, Jiri Caletka) komencis laboron ankoraŭ en la jaro 2011 kaj oni decidis, ke la 18-a IMEK estos dediĉita al memoro de D-ro Josefo Hradil, eminenta ĉeĥa esperantisto kaj kuracisto. La 18-a IMEK estos organizota sub protekto de Silesia Universitato kaj sub honora protektado de la Rektoro de Opava Universitato inter la 10-a ĝis la 15-a de julio 2012. La kongreso estos organizita sur la tereno de Silezia Universitato, kie oni ankaŭ aranĝos komfortan tranoktadon kaj manĝaĵon.

La ĉefa temo de la kongreso estos „Depresio – minaco de la 21-a jarcento”. La aliaj temoj rilatas al: „Rehabilitado kaj ĝia rolo en nuntempa medicino”, „Modulado de glutamato kaj GABA-ergic sistemo en terapio de afektivaj perturboj”, „Vitaminoj kaj kemiaj bioelementoj en nuntempa medicino”, „Flankaj efikoj de trouzado de medikamentoj” kaj aliaj. La rolon de Prezidanto de la Scienca Komitato akceptis prof. dr hab. n. med. Andrzej Pilc en kunlaboro kun prof. dr hab. n. farm. Gabriel Nowak, d-ro KIRYU Yasuo, doc. d-ro Max Kašparu, prof. dr hab. Wojciech Piekoszewski, doc. dr hab. n. med. Jolanta Pytko-Polończyk, doc. dr hab. n. farm. Jacek Sapa. Doc. dr hab. n. farm. Włodzimierz Opoka, Ĝenerala Sekretario de UMEA estas Sekretario de la Scienca Komitato, kiu respondecas pri organizado de la sciencaj kunsidoj kaj Kongresa Libro de la 18-a IMEK kune kun Loka Kongresa Komitato. Internacian konkurson pri Yumeiho® kuracmetodo enkadre de la 18-a IMEK gvidos yumeihoistino Katarina Faragó. UMEA Estraro kaj LKK atendas kontribuojn de multaj kolegoj de Japanio, Hungario, Pollando, Germanio, Ĉeĥio kaj aliaj landoj. Kiel kutime ankaŭ tiu ĉi konferenco havos en sia programo ekskursojn.

La tuttaga ekskurso celos la montaron Beskydy, la lokon Poustevny (montara ripozejo) kaj pravilaĝon en la urbo Rožnov pod Radhostem. Oni vizitos ankaŭ la kastelon Hradec nad Moravicí, proksime de Opava, kie post trarigardo kaj promeno tra parko atendos la partoprenatojn malgranda bankedo. Krome la ekskursojn, oni planas viziton de tipa loka restoracio, interkonan vesperon kun muziko kaj dancoj, vesperan kulturen programon (koncerto, teatra prezentado—espereble ludos Georgo Handzlik, recitado de la esperantista literaturo) kaj viziton de la plej granda ĉeĥa farmaceutika firmao TEVA, kiu lokiĝas 3 km de Opava.

La aliĝkoto, kiu enhavas ĉiujn kostojn egalas al 190 eŭroj.

Okaze de tiu ĉi Kongreso oni aranĝis preparadon de speciala loka ĉeĥa biero el Opava kun la konferenca etikedo. La kongresa teamo provos allogi lokajn medicinistojn kaj atenton de lokaj ĵurnalistoj.

La ĉefa kontakto por la informoj, aliĝilo, ktp. :

Dr. Eva Kopečná

Mírová 31, 746 01 Opava

Česká republika

Rete: eva.kopecna@tevapharm.cz

